

La plej fama esperanta familio en Hungario

Kiel vi priskribus viajn familianojn per iu epiteto?

Estas malfacile trovi unusolan epiteton, kelkvortan karakterizon. Resuminte respondojn de la familianoj, oni venis al bildo kiel sekvas. Mateo: konsciema, analizema, kun granda memdisciplino. Borinjo: pozitiva aliro al problemoj, en la centro de ŝia atento estas la familio, gaja. Marta: tre konscia, helpema “psikologino”, ĉiam plena de ideoj. Judit: energiplena, helpema, klera, diligenta, celkonscia. Blazio: saĝa, engaĝita planlingvisto/E-isto, interesigema. Judit akcentis ke ŝi trovas sian familion familio tre bona, en kiu la familianoj havas bonajn rilatojn inter si, amas kaj helpas sin reciproke, ŝatas havi familiajn kaj parencajn renkontiĝojn, emas intervidiĝadi.

Ni jam scias, ke Blazio Vaha verkis multon, ankaŭ romanojn. Kiaj estas la roloj de viaj familianoj en via sukceso?

Mi verkis multon pri diversaj lingvistikaj temoj: sintakso, verba aspekto, semantiko de verbo en la lingvo Hungara, historio de la Hungara vortordo, historio kaj komparo de lingvoprojektoj, ne laste de Eo. Mi studis infanaĝan dulingvecon – speciale kun Eo: tio estas ke mi studis ankaŭ denaskismon. Miaj artikoloj interlingvistikaj estis kolektitaj kaj aperis en aparta volumo, redaktita de Jozefo Horváth (2018). La romanon *Adolesko* mi verkis en 1978, tamen ĝi aperis nur en 1987. La familio do havis rolon ne ĉe la “naskiĝo de la romano”, sed dum la jaroj de la eldon-atendado pro prokrastoj. Aliflanke, dum la ĵus pasinta jaro 2021 la cdzino ege instigadis kaj

Blazio Vaha (naskita WACHA, Balazs): lingvisto, diplomigis pri Hungara, Rusa kaj Esperanta filologioj ĉe la universitato ELTE, li instruis ĉe la katedro pri Rusa lingvo de la altlernejo en urbo Szombathely [sombathej], poste laboris kiel esploristo en Budapeŝto, ĉe Lingvistika Instituto de la Hungara Scienca Akademio. Ŝatokupoj: Esperanto, esplorado, legado.

Judit Schiller: diplomigis pri Hungara, Germana kaj Esperanta filologioj ĉe la universitato ELTE. Ŝi laboris kiel mezlerneja instruistino, kiel dublo-dramaturgo kaj en diversaj postenoj ĉe pluraj Germanaj entreprenoj. Ŝatokupoj nuntempe: legado, kino.

Marta Wacha: diplomigis pri Italaj filologio kaj kulturo ĉe ELTE. Ŝi instruadis la Italian lingvon kaj Esperanton, delonge ŝi laboras ĉe multnacia entrepreno. Ŝi havas du filojn (10, 4). Ŝiaj ŝatokupoj estas legado, filmoj, renkontiĝoj kun amikoj, sportoj.

Borbala Wacha: diplomigis pri konduka edukado kaj bazlerneja pedagogio e la Budapeŝta Instituto Peto. Ŝi laboris komence kiel konduka pedagogino, prefere eksterlande, nuntempe kiel instruistino. Ŝi havas du filinojn (13, 11). Ŝiaj ŝatokupoj estas sportoj (biciklado, ekskursoj, glitkurado), „familia kino”, hobia fotado.

Mateo Wacha: diplomigis kiel pejzaĝarkitekto, poste kiel inĝeniero-ekonomikisto, en Budapeŝto li laboris kaj laboras ĉe diversaj multnaciaj entreprenoj. Longe li kuris (li plenumis plurfoje maratonon, plej laste ene de tri horoj), liaj nunaj ŝatokupoj estas dancado, filmoj, societaj tabloludoj.

lerni Eon kaj kiel ĝi fariĝis parto de via vivo?

Esence, Eo por la tri infanoj identiĝas kun la patro. Blazio ekde iliaj naskiĝoj parolis kaj parolas kun la infanoj nur en Eo. Judit, kontraŭe, parolas kun la familianoj preskaŭ nur en la Hungara. Ili do estas denaskaj E-istoj kaj dulingvuloj. Kial? Marta tion esprimis jene: “Ni ne havis alian ŝancon.”

Ambaŭ filinoj rakontis ke la uzo de Eo kun la patro estas kaj estis ĉe ili tiom laŭkutima, fiksa, aŭtomata, ke ili ne kapablas (kiam okazis certan fojon intenca provo, ĝi ne sukcesis) tion ŝanĝi. Blazio rakontas, ke se li foje mise diris hazardan frazon en la Hungara, ili tiun frazon ne konsideris – pensis dirita al iu alia. Hazarda misapliko de lingvo okazis kelkfoje ĉe komenco de telefona interparolo aŭ simile. Antaŭ eble du jaroj tamen la patro lanĉis la ideon interparoli en certaj societoj Hungare, sed neniu el la kvar personoj – tri infanoj kaj la patro – sukcesis tiun intencon

lernadis uzi sorobanon kaj faldi birdojn el papero, de ĉarma japanino, ni bakis patkukojn kun Jugoslavaj infanoj, ni saltadis en fojnon kun Arabonaj geamikoj, do mi havas agrablajn memorojn de tiuj someroj. Ni veturis ankaŭ al Puppetra Festivalo en Zagrebo. Kaj ĉefe, ni pasigis trifoje tri ĝis ses semajnojn en Svislando (Ĉaŭdefono), kiam miaj gepatroj laboris tie ĉe KCE. En mia infanaĝo veturado eksterlanden por ni estis ankoraŭ unika afero, kaj mi ĉiam sentis dankemon pro la ebleco tra Eo. Mi tute enamiĝis al Svislando. Mi neniam forgesos la unuan teruran renkontiĝon tie kun fondaĵo, kiu poste tamen fariĝis mia plej ŝatata manĝaĵo, kaj la eblecon de “laboro” jam estante tre juna en la kuirejo (do, eble mi pli ĝenis, ol helpis, tamen ĉiu aprezis mian helpon kaj laŭdadis min). La Svisaj montoj, riveroj, akvofaloj, bovoj poste jam mankis, se mi ne vidis ilin tra jaroj. Estis unika travivaĵo kiam mi ekhavis la E-voĉon de la



Marta, Mateo, Judit, Borinjo, Blazio en 1986

same facila por ĉiu, ne bela laŭ sono). Por mi ĝi estas iom komunismo-etosa ideo (kiu kutime malrespektas direkton de organika evoluo, t. e. de ekonomio, de popoloj ktp.) kaj laŭ mia vidpunkto ĝi malgajnis la batalon kontraŭ la Angla lingvo.”

Borinjo: Por mi Eo kroĉiĝas al mia patro. Mi povus diri preskaŭ ke Eo por mi signifas lin. Mi certas, ke lia celo estis plivastigi tion, sed bedaŭrinde mi ne estis sufiĉe entuziasma. Eble ekskurzo estas por mi, ke mi ankaŭ cetero ne estas tro societema, kun fremduloj mi ne ĉiam konversacias facile.

Eon mi kiel ankaŭ aliaj ofte komparas kaj sentas simila al sekto. Homoj tute diferencaj renkontiĝas pro celo, kredo, espero komuna – tio en nia kazo estas Eo. Estus bele havi Eon kiel inter-

Ĉu via familio havas rilatojn kun aliaj E-familioj?

Tiajn rilatojn ni pli havis ol havas. Krom niaj Hungaraj amikoj (la familioj Császár, Horváth, Bujdosó, Besenyei, Dévai) ni ekkonis la familion Tišljár el Zagrebo, la familion Corsetti-Löwenstein el Italujo kaj la familiojn Pochanke kaj Rokicki el Pollando. La du filinoj foj-foje renkontas tiujn malnovajn geamikojn, kaj tio tamen estas mirinda travivaĵo por ili ĉiuj.

Kia estis la rolo de Eo en via vivo?

Mateo: Infanaĝe ĝi estis ŝatata atmosfero, gaja balono ĉirkaŭ mi. Mi identiĝas ĝin per varma hejmetoso. Kaj pro Paĉjo, kiu multe estis kun mi, kaj pro interesaj E-infanlibroj, kaj pro diversaj E-istaj kunvenoj. Lernejaĝe ĝi ekpezis: mi

helpadis hungarigadon kaj korektadon de la romano por esperata eldono en la Hungara – multajn jarojn post la E- originalo.

Mian E-instrumenton uzadis intense kaj longe Marta; ŝi trovis ĝin eminenta kaj tre facile komprenebla, vere sukcese instrua materialo por komencantoj.

Kio esencas por havi familion kaj bonan rilaton inter familianoj?

Mateo opinias ke la ĉefaj “taskoj” estas konstante atenti pri la aliaj en la familio kaj defendi sin reciproke en plej diversaj situacioj. Kaj tiuj du aferoj (atento kaj subtenemo) devas esti ekde la komencoj. Marta kaj Borinjo konsentas ke plej gravas havi komunajn tempojn. Marta akcentas la komune karakterizan, samkarakteran humuron de la familio, kiun ili volonte aplikas kaj ĝuas kvazaŭ komplace: foje komprenas la nuancojn nur ili mem, dum aliaj personoj nur gapas sen kompreno.

Kiel komenciĝis la vojaĝo de la familio kun Eo? Kiel vi komencis

efektivigi. Jes, se Blazio parolas hungare, ili ne atentis kaj ne rimarkas, eĉ se tio estus ial por ili. Blazio nun diras, ke oni neniam diru pri io ajn, ke tio ne eblas.

Borinjo rakontis jenon: Paĉjo ekde nia naskiĝo parolis al ni en Eo. Tio estis ĉiam tute memkomprenebla por mi. Eo do konstante estas parto de mia vivo, ĝi ja estas lingvo de la komunikiĝado kun nia patro. Apenaŭ uzante la lingvon aliloke, mi havas vortrezoron malgrandan, kaj tio ĝenadas min, malfaciligas la konversaciojn kun mia patro. Tamen, kiam li proponis alternan uzadon de Eo kaj la Hungara, aŭ uzi nur la Hungaran kelkfoje, ni vidis, ke tio ŝajnus tre nenatura, neniu el ni jam kapablas ŝanĝi...

Eo estis parto de mia vivo ankaŭ krom Paĉjo, sed malpli – por mi Eo restis sufiĉe en la familio. Tamen, en mia infanaĝo ni partoprenadis REF-ojn, tra la jaroj. Ni ludadis “Granda urso dormegas...”, ni ekkonis kaj kantis E-kantojn (*La aŭto de la ĉefo, Saĝulo...* ktp), mi

ĉefrolanta knabino Kuĉjo ĉe la dublado de la fama Hungara filmo *En Eŭropo ie...* Ankaŭ Marta havis rolon en ĝi: ŝi estis la voĉo de knabino kiu estas perdanta sian patron.

Pli poste, eble en 1995, mi veturis kun mia fratino al IJS en Wetzlar, kie ni festis Silvestron internacie. Mi ege ĝuis tiujn tagojn, precipe la diskotekojn, kie kundancis ĝejnuloj kun ĉiaj haŭtkoloroj, kulturoj, kredoj ktp.

Lastjare mia patro invitis nin kaj nian familion al Tibiska kunveno de E-istoj (ESTE). Estis agrable refaleti en la Esperantistan mondon, nun jam kun miaj infanoj kaj nevoj. Estis agrabla travivaĝo kajaki sur la belega Tibisko-lago kun direktado de Julinjo Vas-Szegedi, kaj kanti kun la ĝejnuloj E-kantojn, eĉ kiam ekpluvegis. Miaj infanoj ege ĝuis la serĉadon de E-steloj en la urbo, kaj mi rejuniĝis en la amuzparko kun du gedenaskuloj.

Post ESTE mi aŭskultadis literaturajn podkastojn kaj kelkajn intervjuojn de Stela Besenyei, do la komunaj tagoj iom retiris min en la E-mondon, sed cetere mi jam neniom esperantumas.

Ni menciis ĉi tie, ke ĉiuj tri infanoj havas supergradan Hungaran ŝtatan ekzamenon pri Eo.

Judit ekkonis Blazon en la universitato. Post kvar jaroj ili geedziĝis. Dum tiuj kvar jaroj ankaŭ por Judit evidentiĝis ke ŝi ne havas alian vojon ol alprogrigi Eon, ĉar ĉiujn programojn, laborojn, babiladojn, veturadojn de Blazio difinis Eo. Kaj tiel ŝi agis.

Speciale, kion signifas Eo al vi?

Mateo havas akran opinion: “Kiel lingvo ĝi estas malmoderna kaj malperfekta provo krei komunan lingvon por la homaro (ne

nacian lingvon, tio signifus eble certan “egalecon”, tamen ne kompletan. Ellerni ĝin, ne estus same facile al Eŭropanoj kaj Azianoj ekzemple, se ne paroli tiurilate pri denaskuloj.

Blazio: Por li Eo estas iom profesia afero, li ja estas lingvisto, lin interesas la lingvo en si mem, ĝia strukturo, sistemo, funkciado ktp. Li opinias, ke Eo estas unu el la interlingvoj, internacie uzataj lingvoj, kaj oni devus havi normalajn rajtojn kaj eblojn alproprigi ĝin (precipe se temas pri infanoj) kaj heredigi, kultivi ĝin (se oni sentas ĝin parto de la propra kulturo). Eon lernu kaj povu lerni minimume la homoj, kiuj mem volas tion. Krome, Eo kvazaŭ organizas la vivon de Blazio, li ja havas multajn rilatojn kun E-istoj, kaj pli multajn kun E-istoj ol kun aliaj – liaj homaj rilatoj venas el E-istaj medioj. Li mem havas multajn dilemojn rilate Eon kaj Esperanton kaj li vidas multajn kontraŭdirojn. Lin precipe interesas influeblo de la lingvo (kaj de lingvo entute), planebleco, influeblo de lingvoj, krome dulingveco, kaj – iom pli vaste – lin interesas, kiel rilatas al Eo kaj E-istoj mem kaj ne E-istoj.

Ekde kiu aĝo vi instruis Eon al viaj gefiloj?

La alprogrigo de la lingvo okazis ne per instruado, sed per parolado, paralele kun la Hungara.

Kiel lernejoj la infanoj tamen ricevis E-taskofoliojn de Blazio – tion Marta trovis troa, plusa ŝarĝo. Judit aldonis ke cetere eble kaŭzis malfacilaĵojn al la infanoj ke – helpante al ili ĉe hejmaj taskoj – Blazio klarigis en Eo, tiel ili devis lukti paralele kun lernobjektaj kaj lingvaj problemoj.

devis ĝin “defendi” kontraŭ demandoj pri ĝia utileco. Mi devadis klarigi kial ni parolas fremdan lingvon kvankam ni parolas la Hungaran. Tiun pezecon mi sentis pli kaj pli forte, plenkreskante. Tre malrapide, sed mi ekkomprenis, ke ni elŝlosas samfamilianojn (parencojn) kaj amikojn el niaj babiladoj. Ĝi estas sekreta lingvo. Mi hontas paroli fremdan lingvon en kunvenoj kie klare min ne komprenas plimulto de la familio kaj cetere mi kapablas paroli ilian lingvon. Tiu situacio estas tro stranga. Mi jam ne emas klarigi al homoj kio okazas, do mi provas eviti situaciojn kie evidentiĝas ke mi parolas la lingvon. Surbaze de miaj spertoj pri E-istoj mi provas eviti societojn kie ia ideo ŝajnas neracie grava: veganoj kiuj pensas ke ĉiu en la mondo povas kaj devas esti vegano, dancistoj kiuj ĉiutage volas danci kaj ne interesiĝas pri aliaj programoj, fortuloj kiuj valoron vidas nur en agresemo kaj forteco de persono, E-istoj kiuj interparolas sole pri la situacio de Eo ktp.

Kion vi mesaĝas al la legontaro?

Marta: Iru al IJS!

Blazio: Restu tiom toleremaj ene de la E-movado kaj E-mondo kiom da toleremo vi postulas de la ĉirkaŭa mondo!

E-istoj ne estas sufiĉe toleremaj inter si, reciproke, sed ili predikas al la tuta mondo ke, laŭ la idealo de ni E-istoj, oni devas toleri ĉiujn religiojn, oni devas subteni ĉiujn lingvojn, ĉiujn religiojn, kulturojn, tre gravas interhoma kompreno – prave, sed dume ofte mankas interesperantista reciproka kompreno...

intervjuis Hadiĝa Alieva
en Budapeŝto, februaro 2022



Marta, Borinjo, Judit, Mateo, Blazio en 1995